



Norvega Esperantisto

ESP ER AN TO B LA D ET

N-ro 4
1972

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
38-a (43-a) jaro
Monata

JUBILEOJ KAJ AMBASADOROJ

Antaŭ preskaŭ tri jaroj La Urso, la Esperantoklubo en Sarpsborg, proponis al la norvega Poŝto eldonon de poŝtmarko pri Venecio. La klubo substrekis, ke la esperantistoj estas tre okupitaj de internaciaj kulturaj demandoj, kaj ke Venecio ne estas nur itala urbo, sed apartenas al la tuta mondo. La poŝta administracio respondis, ke la poŝtmarka programo estas tute plena pro gravaj naciaj aferoj memorindaj. Venecia poŝtmarko tial ne povas aperi.

Montriĝis tamen, ke la naciaj jubileoj ne estis multaj. Fariĝis pli longa paŭzo inter la poŝtmarkserioj, ol ordinare en Norvegujo dum la lastaj jaroj. Tial La Urso du jarojn poste ripetis sian proponon, substrekante, ke intertempe UNESCO ja instigis al la naciaj poŝt-estrazoj ĝuste eldoni poŝtmarkojn pri Venecio. Ĉi tiun fojon la Poŝto nur informis, ke Norvegujo ne eldonos veneciajn poŝtmarkojn.

Tio - inter aliaj faktoj - meditigis min pri la elekto de la memorindaj jubileoj. La 1100-jara ekzisto de Norvegujo kiel unueca reĝlando ne estis problemo. La 100-jara datreveno de la naskiĝo de nia nobla reĝo Haakon VII same ne.

Wergeland, Grieg, Nordraak, Munch kompreneble ricevis siajn memormarkojn. Sed kial ne aliaj poetoj, verkistoj, komponistoj, pentristoj, kiel ekzemple Welhaven, Kinck, Bojer, Kierulf, Krogh, Werenskiold? Mi nur demandas. Mi nur miras.

La norvega Poŝto, same kiel la brita, estis dum jardekoj tre ŝparema koncerne novajn seriojn. Tiu politiko ne estis malĝusta. Nun ambaŭ landoj iom malstriktiĝis sian retenemon. Oni ekkonsciis pri la ambasadora valoro de la etaj presajoj, kaj oni pri zorge okupiĝas pri la plaĉa kaj arta prezentiĝo. La miloj da kolektantoj estas feliĉaj pro tio.

Sed oni devas demandi sin, kial ne Johan Bojer ricevis siajn markojn - ekzemple kun bildoj el la romanoj! Aŭ la menciitaj pentristoj Erik Werenskiold kaj Christian Krogh, kies pentraĵoj povus esti ambasadoroj en la tuta mondo pri ilia grandioza arto, kaj povus instrui - paralele kun, sed multe pli rapide ol - tradukoj el la literaturo!

En Julio oni festis la 100-jaran jubileon de Roald Amundsen. La norvega Poŝto ne memorigis lin per poŝtmarko. La kaŭzo? Lia portreto aperis sur norvega

poŝtmarko la antaŭan jaron! Sed ankaŭ en la antaŭa jaro oni sciis pri la ĉi-jara jubileo, kaj se la portreto tiom signifas, oni estus povinta lasi la portreton kaj presi la antarktan poŝtmarkon nur kun mapo. Tiel simpla la afero efektive estas!

Cu vi scias, ke Sovet-Unio eldonis

Por ekzerco kaj studo:

LA DIAMANTO

Ĝis la jaro 1866 la dimantoj venis plejparte el Hindujo, kie oni trovis ilin el la sablo. Sed en tiu jaro knabeto trovis dum sia ludo brilan ŝtonon proksime al vilaĝo nomata Kimberley en Sudaŝriko. Tiam la alkuro al Sudaŝriko komenciĝis. Pose-dantoj de nekulturita tero subite riĉegiĝis. Hodiaŭ Sudaŝriko estas la plej grava produktanto de diamantoj.

Vi fortsetter studiene, og ser først på hva «til» heter på Esperanto. Det vanlige er naturligvis *al*: mi vojaĝas al Sudaŝriko. I mange tilfeller må man imidlertid oversette med *de*, nemlig når man har med eierforhold å gjøre: la kato *de* mia onklino. Man ser straks forskjellen i betydningen av den norske preposisjonen «til» i de to tilfeller. I uttrykket «nær» kan man bruke *al* eller *de*: *proksime al* eller *proksime de*, (se teksten ovenfor), mens det ved malproksime vel er rimeligst å holde seg til *de*. Og når «til» betyr «inntil», heter det *ĝis*: *ĝis la jaro 1866*.

«Begynne» heter *komenci* eller *komen-ciĝi*. Her gjøres det stadig feil. La aktoroj komencis la teatraĵon. La teatraĵo komen-ciĝis. Hvis man begynner, setter i gang noe, heter det *komenci*, altså når verbet er transitivt. Er det intransitivt, altså når noe starter, begynner, heter det

poŝtmarkon kun la portreto de Amundsen nun en Julio?

Kaj Amundsen ne estas pli rusa, ol Venecio estas norvega. Iom post iom ni devas kompreni, ke la mondo estas unu, kaj ke la kulturo de la aliaj nacioj koncernas nin.

JHR.

komenciĝi. Tilsvarende ved verbene *fini* og *finigi*.

«Udyrket jord» er ikke det motsatte av dyrket jord. Altså kan man ikke bruke forstavelsen mal-. Denne forstavelse brukes bare ved direkte motsetning: granda og malgranda, fermi og malfermi. «Udyrket jord» er bare jord som ikke er dyrket, og man bruker følgende *ne* som forstavelse: nekulturita tero. Det kan være en god øvelse å ta frem de ord som på norsk har forstavelsen u-, og se om det skal være mal- eller ne-. Prøv med ulukkelig, ustelt, umoderne, ugjeret.

Produsent er vanligvis betegnelse på en person som produserer. På Esperanto er et partisipp med endelsen -o alltid en person. Altså passer det svært godt å oversette «produsent» med *produktanto*. Hva så med Syd-Afrika, som ikke er noen person? Dan anvender man det stilistiske virkemiddel som heter personifikasjon, og sier helt enkelt at Sudaŝriko estas produktanto de diamantoj.

Ak III

L. K. Hunnes gajnis la unuan premion

Ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti, en valoro de 1000 BF (20 (Daŭr. p. 53.)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Ripeto

Ĉiun atunon ni ripetas la samon: La aŭtuno kaj la vintro estas la studsezono kaj la laborsezono de la esperantistoj. Ni devas studi, legi, kunveni, konversacii, korespondi, aĉeti librojn, membriĝi aliajn personojn, verki artikolojn, informi, starigi kursojn, instrui, agadi..

Ni vere petas vin tion fari ankaŭ en la nun venonta sezono. Ni ree petas.

Kaj ni ripetas la repeton!

*

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. Dum Majo—Junio 1972 instruistojn ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Otto Prytz, elementan ekzamenon en Oslo sukcese ple-

numis Oddbjørg Aurdal, Marcella Rief-ling.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1972. Instruistojn ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda kaj Trondheim. (La loka ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.*

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtgiro-konto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de N. E. L.

C. Støp-Bowitz
prezidanto.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. Denove la Liga Estraro insiste admonas al ĉiuj kluboj kaj membroj nun fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en siaj lokoj. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nun starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi la gazetan kurson, kiu nun estas havebla kaj en matricoj kaj por ofsetpresoj. Vidu ankaŭ la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Prelegvojaĝo Ciccanti aŭtune 1973. Ni memorigas pri la plano pri prelegvojaĝo por la itala franciskana monaĥo A. Ciccanti post unu jaro, anoncita en la Junia cirkulero de N.E.L. Kluboj kaj membroj, kiuj deziras aranĝi prelegojn por li, anoncu sin al N.E.L. laŭeble baldaŭ, tiel ke ni povu bone prepari la tutan vojaĝon.

Taskotabelo por kluboj. — *Oktobro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N.O. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizojn kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj kaj oni elsendis unu cirkuleron. La «malŝlosilo» estas nun kompostata. Oni pretigis la jarkalkulon 1971 de N.E.L. Oni ricevis anoniman donacon de kr. 1 000,00 por la Propaganda Fondaĵo. La stando en la foiro «Ferie og Fritid» estis sukcesa, proks. 40 personoj aliĝis al kurso aŭtuna kaj proks. 35 mendis lernolibron aŭ korespondan kurson. La prezidanto partoprenis kunvenon de la Kunlaboro Komisiono de la Nordaj Landaj Esperanto-Asocioj en Västerås. Fondiĝis kaj aliĝis nova klubo: La Vanelo, Jæren Esperantoklubb, Bryne. Otto Prytz kaj Einar Gustavsen fariĝis novaj membroj de la Ekzamena Komisiono anstataŭ Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal, kiuj deziris liberiĝi. Petskribo al la Ministerio pri Ekstero pri vojaĝkontribuo por la Kongreso en Portland rikoltis rifuzon. La Ligo reprezentigis en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S per 254 voĉoj.

La Liga Estraro.

Amiko de Tolstoj



Victor Lebrun naskiĝis en siberia urbeo Wladiwostok. Oni skribis la daton: 20a Februaro 1882.

La patro de V. Lebrun estis fervojista inĝeniero franca. Li helpis konstrui la Siberian fervojon.

Kiam V. Lebrun havis 18 jarojn li skribis al famkonata rusa poeto Grafo Leo Tolstoj kaj demandis: «Ĉu mi povos esti via sekretario?» Poeto Leo Tolstoj reskribis: «Jes!» kaj akceptis V. Lebrun kiel sia sekretario.

Tiel V. Lebrun vivis de 1900 ĝis 1910 — L. Tolstoj mortis en ĉi tiu jaro — ĉiam en la familia rondo de poeto L. Tolstoj.

Poste, ĝis 1924 V. Lebrun vivis en la suda parto de Sovjet-Unio. Kie li kaj edzino rusa vivis kiel kamporanoj kaj abelbredistoj.

1924 V. Lebrun kun sia rusa edzino elmigris al la gepatra hejmloko Puy-St. Réparate/Francio.

La edzino mortis kaj V. Lebrun vivis sole inter vilaĝanoj, kelkajn jarojn poste, la vilaĝo disbrulis; unu domo nur restis, la hejmo de V. Lebrun. La enloĝantoj for-

iris kaj konstruis novan vilaĝon tri km pli norde. De post tiu tempo V. Lebrun vivas sole kiel ermito inter ruinoj.

La jaroj venis kaj forflugis, intertempe la bonego klimato de la Provence sortis la ĉirkaŭaĵon, nun hedero kovras la ruinojn kaj florarboj ornamas la paradizon de la abeloj, kiujn ankoraŭ bredas V. Lebrun.

Oni demandis V. Lebrun: «Kiel vi fartis por resti tiel vigla kaj sana ĝis nun?» Li respondis: «Mi nek fumas, nek trinkas alkoholon kaj marŝas po tage ses km, ankaŭ nun.»

Jes, kaj V. Lebrun trinkas puran akvon, kiun li mem tiras el tre profunda puto. Antaŭ du jaroj li vizitis Moskaŭ kaj restis kvin monatojn. Nun li denove demandis ambasadoron sovjetan pri vizitvizo al Sovjet-Unio.

En Sovjet-Unio kaj en aliaj landoj V. Lebrun havas leteramikojn. En la dometo ĉiutage klakadas skribmaŝino, (ĉirilaj literoj) por skribi ruslingvajn leterojn aŭ skribmaŝino (latinaj literoj) por la korespondado kun E.-amikoj.

Kompreneble la amikaro estas tre granda. Vizitantoj, amikoj, mem rusoj kaj aŭstralianoj vizitas V. Lebrun.

Kun ili ni deziras, ke Victor Lebrun festos ankaŭ sian centjaran naskiĝtagon en Esperantujo.

Helene Stoffers.

*

Daŭr. de p. 50.

L. K. Hunnes - -

us.Dolaroj), al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo «Naturo». Por 1972 partoprenis en la konkurso ĉi sekvaj tri kandidatoj, el kiuj la unua nete gajnis:

L. K. Hunnes el Norvegio kun «La granda Aŭko»

R. de Roover el Belgio kun «Bubuĉjo, la Noktuido»

J. Lazauskas el Litovio kun «Urogalo en Litovio».

Ĉiuj portoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en «La Mevo», organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1973 bonvolu peti regularon al la sekretario M. Halvelik.

KONKURSO SIMONDETTI

p/a Manuel Halvelik
Gebr. Blommestraat 41/0
B-2200 - BELGIO

*

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue	kr. 640,00
A. F.	» 10,00
John Malmquist	» 20,00
«Autogruppen»	» 10,00
K. S. K.	» 50,00
Ingvald Dahl	» 100,00
O. Rygg	» 10,00
H. Danielsen	» 27,00
C. S. B.	» 30,00
Delt årsm. Vestl. Krets	» 50,00
R. Bugge-Paulsen	» 30,00
R. A. Throndsen	» 20,00
	<hr/>
	kr. 997,00

KAMPANJO REISÆTER

Pli frue	kr. 1 500,00
Karen Berge	» 100,00
E. Vorland	» 100,00
	<hr/>
	kr. 1 700,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Informoj el UEA

PLI DA SONBENDOJ

Kreskas la merkato por Esperantaj sonbendoj. Tion konstatas la Magneto-fona Servo de UEA, kiu raportas, ke en la pasinta jaro 1971 ĝi vendis 121 programojn. La servo eĉ montris malgrandan profiton de ĉ. \$ 100. La mendoj venis el Usono, Kanado, Japanujo, Aŭstralio, Hispanujo, Nederlando, Finnlando kaj Nov-Zelando.

La Magnetofona Servo disponas nun pri 292 programoj. La uzantoj de la Servo povas elekti inter paroladoj de Ivo Lapenna, Edmond Privat kaj aliaj oratoroj, teatraĵoj kaj kantoj, programeroj de la Universalaj Kongresoj ekde Mainz en 1958 ĝis la lasta en Londono — kaj eĉ la voĉon de d-ro L. L. Zamenhof mem, kopiitan de sur malnova vakscilindra registraĵo. Listo de ĉiuj disponeblaj bendoj — kune kun la tarifo kaj mendo-kondiĉoj — estas ricevebla ĉe la komisiito s-ro Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado.

KUBANOJ INSTRUAS

La kerno de novaj membroj de Universalaj Esperanto-Asocio en la insulo Kubo vige aktivigis en informado kaj instruado. Apogas ilin senpaga helpo de UEA en la formo de revuoj, vortaroj ktp. La Peranto de UEA en Kubo mem sukcesis laste enpenetri en radioamatorajn rondojn kaj varbis per tiaj elsendoj novajn lernantojn por hispanlingva koresponda kurso loke organizata. Novaj kursoj ekfunkciis inter la laborantoj de la Instituto por Normigo kaj Mezurado kaj de la Akademio de Sciencoj. Inter pluraj lastatempaj radio-elsendoj kaj

gazetartikoloj pri Esperanto estis artikolo en la revuo «Verde Olivo», oficiala organo de la revolucia armeo de Kubo.

NI MEM

EKONOMIE

Vi eble memoras, ke ni pli frue parolis pri la ekonomio de nia gazeto? Nu, ni daŭre kolektas kaj vendas uzitajn poŝtmarkojn. Ĉio koncerne poŝtmarkojn: Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.

BUTIKE

Vi eble memoras, ke ni vendas poŝtmarkojn? Se vi ne kolektas mem, eble vi konas iun knabeton, kiun vi povus ĝojigi per donaco. Ĉio koncerne poŝtmarkojn: Hulderveien 17 B, Sarpsborg.

MIL POŝTMARKOJ

Guste nun ni havas mil poŝtmarkojn, kiujn ni vendas por po 20 øre, senkonsidere al la katalogaj prezoj. Temas pri i.a. sportaj, floraj, bestaj, usonaj kaj polaj pm. Ĉio koncerne poŝtmarkojn: Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.

LAŬTEME

Vi eble scias, ke la vorto «laŭteme» povas signifi «laŭt-eme» kaj «laŭ-teme». Ĉi-foje ĝi signifas «laŭteme». La ideo estas, ke vi povas elekti laŭ la temo, se vi mendas poŝtmarkojn ĉe ni por fortikigi nian ekonomion. Ni rekomendas: sporto, arto, floroj, birdoj, bestoj, famuloj, urboj, ĉevaloj. Ĉio koncerne poŝtmarkojn: Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.

PAKE

Vi povas aĉeti poŝtmarkajn pakaĵojn ĉe ni. La plej malmultekostaj estas la

dukronaj kovertetoj, kiuj ankaŭ donas premioŝancojn. La plej multekostaj estas momente la 100-kronaj. Sed vi sciu, ke eĉ centkronajn vi povas aĉeti grandnombro. Ĉio koncerne poŝtmarkojn: Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.



Pripensu ferion sur Côte d'Azur!

Cassis estas idilia banloko kiu situas 20 km oriente de Marseille. Tie loĝas la geesperantistoj, gesinjoroj Stoffers en Ville «TABOU», kie ili bonvenigas turistojn el la tuta Esperantujo, kiuj deziras lupreni ĉambrojn.

Manĝaĵon oni mem povas prepari en aparta kuirejo.

Kiam en februaro la glacifloroj normale ornamas la fenestrojn, tiam jam floradas la mimozarboj kaj kantas la najtingaloj en la ĝardeno de Villa «TABOU», kaj en la ĉirkaŭaĵo staras florantaj migdalarboj. Fruprintempe, aŭ en oktobro — eĉ en novembro, oni povas bani sin en la blua Mediteranea Maro.

Pripensu nun ferion ĉe ni!

Por pluraj detaloj, skribu en Esperanto (aŭ germanlingve) al

Sino Helene Stoffers
Villa «TABOU»
Supercassis 47
F-13260 CASSIS
Francio.

Mia Juneco

Abrahamo Ben-Herut

Mia juneco jam forpasis kiel ombro.
Kien ĝi malaperis? Kien ĝi kaŝiĝis?

Mi ne scias se iom mi demandas la tempon.

La tempo respondas al mi: —

En la profundo de via animo

Vi serĉos vane vian junecon,
tamen vi ne trovos ĝin.

Ĉar via juneco maljuniĝis;

Nur sopirojn ĝi lasis al vi.

Kiel malproksimojn rememorojn.

Ĝia odoro incitetas vin;

simila al ombroj malstreĉaj

Kuras vi vane.

Sed, ĝis via juneco

Vi neniam alvenos.

Ĉar la juneco amas la junecon.

Via juneco perfidis vin eterne.

Kiel dolĉa revo malpermesita,

Kiel aŭtuna vento monda, malvarma.

Post-kuranta sekajn foliojn,

Tiel vi sekvos post via juneco,

Vi kuros eterne, sed vane,

Ĉar vi nenion povos atingi ĝin!

Neniam!

JUBILEOJ

La 24-an de Julio *Gustav Kühlmann*
estis 60-jara.

La 7-an de Aŭgusto *Lennart Aberg*
estis 60-jara.

Al ambaŭ sinceraj postfestoj gratuloj!

La 26-an de Majo *C. Stop-Bowitz* havis
25-jaran jubileon kiel prezidanto de
Norvega Esperantista Ligo. Tiu jubileo,
nerimarkite pasinta, meritas ĉies atenton
pro la vere sindona laboro, kiun faris nia
prezidanto dum kvarona jarcento.

Dankon, dankon!

KIU ARBO ESTAS LA PLEJ RAPIDA?
DEMANDO:

Granda norvega entrepreno, Borregaard, starigis fabrikojn en Brazilo, ĉar la eŭkaliptoj tie kreskantaj pli rapide reproduktiĝas ol la norvegaj piceoj. Kiu arbo estas la plej rapida?

Scivolulo

RESPONDO:

Eĉ la nomo indikas, ke la plej rapida estas la t u j o .

Hipopotamo

Kjell Walraamoen

Arbarhakisto revas

Sidanta sur la trunko
li sin forrevas,
sed kiam sabato venas
la revon forsangos,
nur la sopiro restas
rodante l'animon —


Pri loko eta de l'tero
li revas,
sufiĉa por fajrujoj, tablo
lito kaj kvar muroj.
Li revas pri ŝnuro
sur kiu sekigantaj vestaĵoj
pendas
kie ŝiaj kostumoj
palruĝaj kaj blankaj
karesas unu la alian
pro vento —
Li revas pri lulilo
en kiu l'etulo balbutas.

Li stariĝas de l'trunko
kaj ĝemas.
Ekprenas la hakilon
por denove haki.
Estas tamen neniu kiu
atendas lin hejmen.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubbyen 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



(El la Bulteno de la aŭstria IFEF-sekcio)

Inernaciaj fervojnovaĵoj

Okcident-Germanujo:

La konstruado de la nova fervojstacio «Olympiafeld» en Munkeno progresis tiom rapide ke ĝi jam aŭtune pretiĝis.

La stacidomo havas en la unua etaĝo la necesajn funkciajn ejojn kaj en la dua kiu konstruiĝas kiel paviliono, estas ejoj por la pasaĝeroj.

En majo 1972 okaze de la pilk pieda ludo inter Germanio kaj Sovetunio, la stacidomo estis por unua fojo en uzo.

Dum la olimpiaj ludoj la trajnoj de la urba fervojo (S-bahn) veturis tra la nova fervojtunelo en la centro de la urbo al la stacidomo «Olympiafeld» de la 8,30a matene ĝis la 21a vespere. Ordinare veturiĝas 6 trajnoj po hore kaj ili kapablas transporti pli ol 11 000 pasaĝerojn. Maksimale la kapacito de la stacidomo «Olympiafeld» estos 20 trajnoj po hore.

Italio:

En Trieste oni konstruas novan plejparte subteran linion kiu donas al la haveno pli bonan fervojan konekton. La konstruado daŭros 4 jarojn.

La kuna linio al la haveno kondukas tra la centro de la urbo kaj la surstrata

trafiko ofte tre malhelpas la fervojtrafikon.

De tempo al tempo okazas ke la trajno al aŭ de la haveno devas atendi dum horoj pro malkorekte parkitaj aŭtoj. La nova linio eliminos tiuj malfacilaĵojn

La plej longa fervojtunelo en Eŭropo norde de la alpoj.

Laŭ la fervojlinio Oslo—Drammen konstruiĝas nova 10,7 km longa tunelo tra la altaĵo inter al stacioj Asker kaj Drakerøya. En februaro 1963 la laboro komenciĝis de ambaŭ flankoj de la monto. Pro la malbona kvalito de la roko ĝi laŭ plane daŭros 7 jarojn, sed iom post iom oni devis rezigni je tiu tempoplano. Argilo ŝvelema miksa kun frakasitaj ŝtonamasoj necesigis ampleksajn sekurig-laborojn kaj por ke la krevado okazu sendanĝere kaj pro la konstanta sekurigo de la tunelo por la estonta trajntrafiko.

Dum la tuta laborperiodo okazis geologiaj esploroj laŭ modernaj metodoj kaj ili montris ke estos necese iomete ŝanĝi la direkton de la tunelo per enkonstruado de du kontraŭkurboj. Per tio oni sukcesis pli rapide frakasi tre malfacilan sekcion de la roko. Sammaniere oni evitis enpenetron de akvo en la tunelo de lageto situanta sur la altaĵo super la tunelo.

La profilo de la tunelo mezuras 60,5 m. Ĝi estas 6,5 metrojn alta kaj 9 metrojn larĝa.

Gratulon al Otto Prytz

Nia samideano Otto Prytz faris sian lektoran ekzamenon ĉe la Universitato en Oslo, kaj akiris la titolon *candidatus philologiae*. Otto Prytz estas la dua blindulo en Norvegujo, kiu akiris tiun titolon. Liaj fakoj estas rusa lingvo, lingvoscienco kaj hispana lingvo, la lasta kiel ĉeffako. En ĉiuj fakoj li brile sukcesis. Otto Prytz nun estas instruisto pri hispana lingvo ĉe la Universitato en Oslo. Nian gratulon!

JUBILEA PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO EN JUGOSLAVIO

De la 30-a de Septembro ĝis la 6-a de Oktobro 1972 okazos en Zagreb, Sisag kaj Varazdin la V-a Pupteatra Internacia Festivalo en Esperanto. Tiun «superfestivalon» partoprenos krom la venkintoj de la antaŭaj P.I.F.-oj (Cluj, Constanta, Košico, Budapeŝt kaj Poznan) ankaŭ eminentaj trupoj el Parizo, Metz, Montréal, Bjelostok, Ljubljana, Hamburg, Romo, Kopenhago.

La tuta programo estos ripetata en la tri gastigantaj urboj. Tamen la centra parto okazos en Zagrebo, kun pionira venkontiĝo, por kiu jam anonciĝis centoj da junaj esperantistaj pioniroj el kvin landoj.

Estus superflue substreki ke P.I.F. atendas ne nur infanojn sed ankaŭ plenkreskajn esperantistojn el la tuta mondo. La aliĝkotizoj estas la jenaj (por partopreno en Zagreb): pensiono en 2-lita ĉambro 750 din., pensiono en 1-lita ĉambro 850 din., pensiono en privata loĝejo 650 din. (ĉiuj prezoj enhavas ankaŭ la

kompletan programon de P.I.F.). Por infanoj, bv. peti la specialajn kondiĉojn. Aliĝojn akceptas kaj informojn donas: P.I.F. P.F. 703, 41 001 Zagreb, Jugoslavio.

Grandarbo falis

Halvdan Karterud mortis

Forta bato iris tra la lando. Halvdan Karterud forpasis. Post kelktempa malsano li mortis la 30an de junio 1972, havante preskaŭ 78 jarojn. Unu el la pioniroj de la blindula laboro ne plu estas inter ni.

Jam kiel infano li fariĝis blindulo, sed li neniam cedis aŭ rezignis pro tio. Tra sia tuta vivo li montris kuragecon kaj volon supervenki la barojn, kiujn la blindecoj kaŭzis, kaj tio estis grandega instigilo ankaŭ por liaj samsortanoj.

Estas malfacile imagi al si ian homon, kiu pli bone ol Halvdan Karterud meritas la nomon: superenergiulo. Lia agado estis preskaŭ senlima. Li estis unu el la ĉefaj kolonoj de la blindula laboro en Norvegujo; li estis dum vico da jaroj prezidanto ne nur de Nordenfjeldske Blindforbund, sed ankaŭ prezidanto kaj sekretario de Norges Blindforbund; li estis unu el la fonditoj de Verdensrådet for Blinde en Oxford kaj de Verdensforbundet for Blindelærere; li estis honora membro de Norges Musikk lærerforbund; li estis kun-eldonisto kaj kunredaktoro de «Trøndersk Musikkblad»; li estis neforgesebla recitativisto kaj lirikisto, kiu dum la jaroj sorĉis milojn da homoj per sia ludo kaj deklamo; li estis muzikkritikisto kaj recenzisto en la trondhejmaj gazetoj «Nidaros» kaj «Arbeider-Avisa»;

li estis unu el la probatalantoj de la Esperanta movado en Norvegujo, estante esperantisto ekde 1910; li estis kunfondinto de Norvega Asocio de Blindaj Esperantistoj (NABE) kaj ĝia unua prezidanto; li estis viceprezidanto de Universala Asocio de Blindulorganizaĵo (UABO) kaj honora membro de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE); li ankaŭ estis prezidanto kaj honora membro de GET; li gvidis la perkorespondan instruadon inter la blinduloj en Norvegujo; li incitatis la Esperanto-rubrikon en «Norges Blinde» (1925—1930), la organo de Norges Blindeforbund, kaj la brajlan Esperanto-gazeton «Antaŭen» (1932—35); li sukcesis enkonduki Esperanton kiel devigan fakon ĉe Dalen off. skole for blinde en 1933 ktp., ktp.

Li ankaŭ estis eminenta ŝakludisto, ŝatata prelegisto kaj artikolverkisto, delegito dum universalaj blindulkongresoj kaj konsultanto pri eldonado de lernolibroj kaj muziknotoj en brajlo. Li mem transkribis plurajn librojn en brajlon. Sed antaŭ ĉio li estis la instruisto, la gvidanto, la vojmontrilo por miloj da blinduloj en Norvegujo. Ekde 1917 li estis instruisto ĉe Dalen blindeskole, kie li disvolvis viglan kaj ampleksan laboron — ne nur kiel instruisto en tradicia senco, sed ankaŭ kiel instiganto kaj kamarado. Li neniam forgesis siajn lernantojn, same kiel ili neniam forgesos lin.

Dum la lastaj jaroj li multe favoris pri la nova sanocentro en Kastvollen kaj estis i.a. membro de la konstrukomitato. Sed la tasko, kiu ĉefe okupis lin, estis la laboro pri la brajla Esperanta-norvega vortaro, kiun li bedaŭrinde ne sukcesis finpretigi. Sed lia edzino intencas finfari tiun laboron.

Malgraŭ tio, ke li jam estis markita de sia malsano, li — pro sia fera volo — sukcesis fari la ĉefparoladon en Løten okaze de la 17a majo ĉijare. Per tio li ne nur plenumis malnovan promeson al sia kara hejmloko, sed ankaŭ diris la lastan adiaŭon al ĝi.

Halvdan Karterud estis riĉa personeco, kaj pro liaj multflankaj laboroj por la blindula afero, li en 1960 ricevis la Reĝan Meritmedalon en oro, kaj en 1969 NEL honorigis lin per la grado Komandoro de la 2a klaso de Pro Merito pro lia vasta laboro por Esperanto.

Ĉiuj, kiuj ĝuis la privilegion esti unu liaj geamikoj — kaj ili estis multaj — volas konservi la memoron pri li en profunda dankemo. Ni deziras pacon al lia memoro!

LKH

La internaciaj ferioj Esperanto-kursoj en Helsingør

23.-30. 7. 1972

La kursojn, kiuj okazis de la 23a ĝis la 30a julio partoprenis 135 personoj inkludante instruistojn. Estis po unu el Aŭstralio kaj Skotlando, du el Usono, ses el Norvegio kaj la ceteraj el sep diversaj landoj, nome Svedio, Germanio, Anglio, Francio, Nederlando, Danlando kaj Svislando. Do vere internacia rondo. Jam de la unua tago sonis la Esperanta lingvo de ĉiuj anguloj. Eestis necese uzi ĝin. Neniu alia lingvo estas uzebla inter homoj de tiom da diversaj nacioj.

Kvar generacioj estis prezentataj, sed tio ne kaŭzis problemojn aŭ konfliktojn. Infanoj, junuloj, gepatroj, geavoj kaj pravaĵoj harmonie kunestis la tutan semajnon.

Oni aranĝis kvar kursojn kaj unu studrondon. Mi partoprenis la studrondon. Estis interesa, amuza kaj valora. La partoprenantoj proponis aŭ prezentis diskutindajn temojn kaj la gvidanto instigis nin al diskuto kaj aktiveco. La diskutadoj ĉiam estis viglaj, ĉar ĉiuj en la rondo devis partopreni. La gvidanto prizorgis tion. Li ankaŭ instruis nin pri gramatikaj aferoj kaj bonstila uzo de Esperanto.

La aliajn kursojn mi ne vizitis, sed ke ili bone funkciis, rakontis al mi la kursanoj, kun kiuj mi interparolis dum liberaj horoj.

El la lernejo de Jylling (ĉe Roskilde) ĉeestis instruisto A. Skovrind kaj dek gelnantoj, Io-II-jaraj. Krome ĉeestis ok infanoj el diversaj landoj. Ili ĉiuj partoprenis la kurson por infanoj gvidatan de s-ro Skovrind. Ĉe la finfesto oni povis konstati ke la infanoj bone lernis, ĉar tiam ĉiuj el ili kontribuis al la distra programo.

Tre interesaj kaj amuzaj estis la posttagmezaj ekskursoj.

Ĉe la kafotabloj en la sidĉambro ekestis amikeco inter la kursanoj. La kunestado tie donis bonan eblecon por praktika uzo de Esperanto, kaj vigle sonis la interparoloj Esperantlingve. Krokodiladon oni preskaŭ neniam aŭdis.

La vesperaj programoj tre plaĉis al mi. Oni multe lernis aŭskultante interesajn prelegojn de spertaj esperantistoj. Ankaŭ la humoraj kaj amuzaj bonstile prezentataj valoras multe kaj estas pli facile memoreblaj ol seriozaj sciencistaj prelegoj.

Vidindaj estas la filmoj kaj lumbildoj pri venintaj Esperanto-aranĝoj, kiuj estis montrataj al ni. Multaj konatoj estas videblaj sur la bildoj.

Je la alveno la infanoj ricevis aŭtograf-libretojn. Dum la semajno ili kolektis

aŭtografojn inter la plenaĝuloj. Al la infanoj oni promesis premiojn pro plenigitaj libretoj. Dum la finfesto la libretoj estos kontrolataj. Kiam la semajnfino alproksimiĝis, la infanoj tre fervore petis pri aŭtografoj.

Jam estas sabato. Fino de la semajno. Ĉivespere Okazos la adiaŭa festo. Tro rapide la tempo foriris.

La festo estis sukcesplena. Kaj la festkomitatanoj kaj la aktoroj meritas laŭdojn pro la bona, varia kaj amuza programo.

Parton de la programo mi volas mencii.

La infanoj estis vokataj al la scenejo. Tie staris s-ro Friis. Li kontrolis la aŭtograf-libretojn, laŭdis la infanojn, ĉar preskaŭ ĉiu sukcesis pleniĝi sian libreto Premio estis disdonataj. Ĉiu aŭtograf-kolektinto ricevis skatoleton da ĉokolado. La ĉeestantoj forte aplaudis. Ĉarmegaj estis la infanoj starantaj laŭvice sur la scenejo.

La festprogramo finiĝis je la 23a horo. Sed multaj el la kursanoj ne emis enlitiĝi. Ni eniris la sidĉambrojn por ĝui la lastan horon de la kunestado.

Tre agrabla feria semajno travivita Longe ni ĝin memoros.

Lovise Bøe.

*

Alarma sciigo

Sekundnovelo de Willy Breinholst.

La vidvino de peltaĵo-fabrikanto Kitlemark, la iom troekspozita sinjorino peltaĵo-fabrikanto Hilda Kitlemark, loĝis kune kun siaj du infanoj en granda, kolono-ornamita blanka vilao ie en la periferio de la urbo. Iun matenon kiam la sinjorino ankoraŭ kuŝis en sia lito kun la vatita molanaslanuga kusenego tiritata

super siaj blankaj ŝultroj, iu singardeme prapis la pordon, kaj la ĉambristino eniris kun urĝletero sur arĝenta pleto.

Ĉu la sinjorino dormas?

La sinjorino ete turis la kapon.

Kion vi volas, Anna? ŝi demandis dormeme kun laca rigardo sur la horloĝo sur la noktotablo.

Jes, respondis Anna. Estas urĝletero de la distriktasisto en Flatbygd.

La sinjorino duone levis sin en la lito. Ŝi malamis esti vekata tiom senrespekte frue. La horloĝo ne montris pli ol precize la dekan.

Malfermu ĝin! ŝi koncize diris. Anna ĝin malfermis kaj transdonis ĝin super la liton. La sinjorino prenis ĝin kun dormena oscedo, komencante legi. Ĝi tekstis:

Kara sinjorino. La unuan fojon kiam mi havis plezuron korespondi kun vi, estis la nuna somero kiam vi kaj viaj du filoj, Svein kaj Knut, loĝis tie ĉi en via kampara loĝejo en Flatbygd. Kiel vi eble memoras, damaĝo okazis al Svein, kiu tiun fojon havis sep jarojn, mortpafi unu el miaj bovinoj per salona pafilo, kaj ni interŝangis, okaze de tiu, konsiderante la junan aĝon de la pafisto, iom unika ĉasfaro, kelke da leteroj.

La sekvantan someron via luphundo Rosa mortmordis kvar el miaj ŝafoj, kaj ĉar nek vi nek Rosa interesis sin por havigo de buŝumo, ni denove interŝangis kelkajn leterojn, cetere mi korespondadis kun vi kiam via filo Knut la saman someron kune kun kelkaj samaĝaj kamaradoj helpe de kelke da miaj fojno-faskoj faris fajron de Sankta Johano, pro kio fajrero ekbruligis pajlan transportilon en la proksimo.

La postan someron mi korespondadis kun vi okaze de tio, ke Knut iun tagon

sin trovis instigita fari provveturon sur laŭ la vojo en via novakirita multekosta amerika aŭtomobilo, kaj estis tiel malfeliĉa direkti la veturon rekte tra unu sur mia bieno starigita ŝtalfadena kaĝo, per kio kvin anseroj malfeliĉe perdis sian vivon.

La sekvantan someron mi ne estis en kontakto kun vi, escepte de tio, ke vi iun tagon telefonis al mi, klarigante kiaj teruraj aferoj okazos al mi kaj mia domo, se mi ne tuj alvenos malsupren al via kampara loĝejo kaj mortigos nesingardeman bovidon, kiu trabatis al si vojon en vian dormoĉambrojn. Vi substrekis per fortaj esprimoj la nepardoneblecon, ke mi ne ŝnurligis miajn bovinojn pli bone, kaj la interparolo ĉesis ne plifruo ol ke la posedanto de la bovino, bienulo Mikkelsen, Nordbø, aperis kaj forigis la bovidon.

La lastan someron mi denove havis la plezuron interŝangi nombron da ĉu ni nomu tion notoj — kun vi. Kiel vi eble memoras, la okazo tiam estis ke viaj du filoj, alivestitaj kiel la, en ĉi tiuj regionoj, tiom timitaj «wild-west» herooj Hopalon Cassidy kaj Davy Crockett, dum ŝnurkaptado de miaj ĉevaloj pelis la virĉevalon Prins en marĉon. Mi poste vendis la kadavron de Prins al detrua instituto por 200 kronoj. Dum la besta ekspozicio la antaŭan jaron tiu ĉi virĉevalo atingis la honoran premion de la societo de bredado de ĉevaloj de Bråten.

Fine mi korespondadis la lastan aŭtunon kun vi baldaŭ post kiam vi kaj viaj filoj forlasis la kamparan loĝejon tie ĉi por returni al la urbo. La okazo tiam estis parte ke Svein kaj Knut per elastik pafilo frakasis dek sep fenestrajn vitrojn en mia bovina stalo, kaj parte ke ili per sago kaj pafarko mortpafis tri kokinojn

(du blankajn Wyandott kaj unu helan Sussex) dum unu el siaj tiom ŝataj Robin Hood-atakoj kontraŭ mia bieno. Fine ili poste, kiam ili ludis la rolon de ĉi tuj tie ĉi en Flatbygd tiom malbonfamaj Sioux-militistoj «Nigra piedo» kaj «Blanka nuboj», kaptis mian edzinon, ŝin ligan-te al la akvopumpilo por danci militdan-cojn ĉirkaŭ ŝi, post kiam ili per malakra heĝotondilo tondis kelke da koloroj de ŝia skalpo, por — kiam la helpo atingis mian edzinon — kriegantaj forkuri profunde en miajn tritikokampojn.

Kiam mi nun hodiaŭ denove skribas al vi, kara sinjorino peltaĵo-fabrikanto Kitlemark, estas nur por ke neni povu min riproĉi ke mi pro iuj el la cititaj kaŭzoj min sentus allogata reteni sciigon, pri kiu estas mia devo kiel bona najbaro vin informi, tiel ke vi povu fari la disponejoj kiujn vi trovos necesaj.

Kara sinjorino. Via kampara logejoj brulas.

Tradukis
Rudolf Dreyer

(Aftenposten 26/5 1962)



OM FORSKJELLIGE SLAGS LODDER

På mange Esperanto-klubbmøter foregår det utlodninger, og i den forbindelse er det mye uriktig språkbruk å høre. Å lodde ut heter *lotumi*, og det ordet blir som regel brukt riktig. Et lodd eller en loddseddel heter derimot ikke *loto*, som mange tror, men *loteribiletto*. Det er et langt og tungvint ord, men jeg kan dessverre ikke finne noe kortere.

Hva betyr så *loti*? Å trekke lodd, kaste lodd, la skjebnen avgjøre. Lodd-trekning heter altså ikke *lottirado*, men ganske enkelt *lotado*. Det er forresten samme ord vi har i uttrykk som «det falt i min lodd», og *loto* har vært brukt på Esperanto også i denne betydningen, men *sorto* er bedre.

Men lodd kan være så mangt. Det kan f. eks. være vektlodd. Det oversettes som regel med *pezilo*. Selv om Zamenhof har brukt dette ordet, kan jeg ikke skjønne at det er en riktig oversettelse. *Pezilo* betyr jo «ilo, per kiu oni pezas». Et vektlodd er «aĵo, kiu havas certan pezon». Kan noen finne et ord som dekker denne betydningen, er jeg svært takknemlig.

«Lodde» har også flere betydninger. Vi kan lodde metaller, og det heter *luti* på Esperanto. Men vi kan også lodde stemninger, dybder osv. I så fall må det hete *sondi*. Vi har jo også ordet «sondere» på norsk. Et ekkolodd er noe som lodder dybden, og det heter *ehosondilo*.

Når jeg først er inne på fiskeri, må jeg nevne fisken «lodde». Den heter på latin «*Mallotus arcticus*» eller «*Mallotus villosus*». På Esperanto skulle det bli *maloto*. Det har ingenting med ordstammen *lot-* å gjøre, selv om det latinske ordet *Mallotus* kan se ut som den stammen med prefikset *mal-* foran. Opprinnelsen til det norske ordet «lodde» må vi heller søke i adjektivet «villosus», som er det samme som *vila* på Esperanto. Det betyr «lodden».

Men nå er det best å slutte før jeg dummer meg *lodd*-rett ut.

Otto Prytz.

NORVEGA Kroniko

OSLO

1/2. 72. La prez. Annalise Rees malfermis la kunvenon, kaj donis la parolon al C. Støp-Bowitz, kiu disdonis ekzamenajn diplomojn al Stefan Murak, kiu plenumis la superan ekzamenon, kaj al Wenche Eng kaj Ivar Gudmundsen, kiuj plenumis la elementan.

Støp-Bowitz rekomendis al ĉiuj ekstudoj por ekzamenoj. Tio povas ankaŭ esti pluse en la ordinara vivo, kaj precipe plialtigas la lingvan nivelon de nia klubo.

Okaze de la Internacia libro-jaro Annalise Rees — kiel Vortojn por Pripensoj — legis poemon de Piet Hein «Boken» (La Libro).

Pepita de Caspary parolis pri «La valoro de la Esp.-libro». Interalie ŝi citis eldirojn de K. Kalocsay kaj de Emilija Lapenna. Ĉiuj esperantistoj devas aĉeti Esp.-librojn, precipe ĉar — se ni ne aĉetas librojn, la libroj ne havos ŝancon pliboniĝi. Eĉ se oni ne legas ilin tuj, oni eble — aŭ verŝajne — legos ilin pli poste. Aĉeto de libroj estas grava kontribuo al la movado. En ŝia hejmurbo Sabadell oni donacas librojn al tiuj, kiuj faras ekzamenojn. Eble estas io por pripensoj ankaŭ por nia klubo. Plie, ŝi eljetis la ideon pri librorondoj: ĉiu partoprenanto aĉetu unu libron kaj la membroj de la rondo havas okazon legi plurajn librojn por la elspezo de unu.

Ludvig Anjer rakontis ke li ricevis salutojn el Hinujo kaj Polujo ĉar li sendis salutkartojn al ili. Li ankaŭ rekomendis al la ĉeestantoj esti Membroj Abonantoj de U.E.A. — tiel oni ricevas

12 numerojn de la gazeto «Esperanto» jare, kaj la Jarlibron, i.a. kun la adresoj de la miloj da Delegitoj.

Otto Prytz rakontis ke li aŭskultis intervjuon de la Pola Radio kun Pepita kaj ŝiaj gepatroj, gesinjoroj Ĉriach; ankaŭ paroladon de d-ro Zamenhof dum la 5a U.K. en Barcelona en 1909.

21/2. 72. La vic-prezidanto Thor Magnus Carlsen deziris koran bonvenon al ĉiuj, kaj precipe al nia gasto Bjørg Slapgård.

Th. Smådahl tre bone kaj interese redaktis la kluban gazeton «LA VAGABONDO»n.

C. Støp-Bowitz montris gazetajn eltondaĵojn por la jaro 1971. La rezulto estis tre kontentiga: proks. 473 eltondaĵoj el 107 gazetoj, kio estis pli ol en antaŭaj jaroj, kaj espereble montras kreskantan intereson por nia lingvo.

Otto Prytz memorigis pri du programeroj en la Norvega Radio, nome: «Kort sagt — ordet er ditt», al kiu oni povas ensendi du-minutajn eldirojn por elsendo en la radio. Krome, mardon kaj vendredon oni povas telefoni demandon pri iu ajn afero, kaj espereble havi respondon en la radio la saman tagon.

La hodiaŭa kunveno estis dediĉita el La Semajno de Internacia Amikeco. La ĉeestantoj kolektigis ĉe longa tablo kaj skribis amason da salutoj al amikoj, radiostacioj k. s.

Harda Danielsen.

Korespondu

Mi serĉas en via lando korespond-geamikojn. Mi estas 23-jara ministro, kolektas poŝtmarkojn, kolorajn bild-

kartojn, mineralojn, interesas min pri fotografado, hemio, vojaĝoj k.a. Manfred Kirsch, August-Bebel-Str. 9, DDR-6506 Ronneburg.

S-ro Josef Jelinek, Mezibori 183, okr. Most, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn (ĉefe kolorajn), gramofondiskojn, revuojn, insignojn, svenirojn, sonbendojn kun tutmondaj amikoj. Mi korespondas esperante, germane, france, ruse kaj angle.

Mi estas hemiisto kaj laboras kiel ĉefulo en grava ŝtata karbomineja entrepreno, troviĝanta proksime de la Fajrolando. Do nia regiono estas malvarma, kaj mi tutkore deziras kontakti kun norvega samideano por havi seriozan interkorespondadon pri terkulturado, nacia kulturo kaj interŝanĝi semojn k.t.p. José Drucker, Apartado 6, 28 de Noviembre, Santa Cruz, Argentino.

Oficistino, komercantino, kiu interesiĝas pri norvega vivkulturo, arto kaj kutimoj, tre deziras korespondi kun esperantistino el Oslo aŭ alia urbo. Janina Markiewicz, ul. Londynska 14, m. 32, Warszawa 33, Polujo.

Multaj komercantaj esperantistoj deziras korespondi: 1) Nikolaj Starodubcev (33-jara klubgvidanto), poŝtrestante, 340047 Doneck, Sovet-Unio. 2) Ludmila Butko (17-jara knabino), str. Lysenko 46, 340087 Doneck, Sovetunio. 3) Interklubo «Globus» (70 anoj 15—17 jaraĵ), Mezlernejo N 103, str. Dunajevskogo 1, 340039 Doneck, Sovetunio. 4) Klubo de Internacia Amikeco (40 anoj, 15—17

Deziras korespondi kun norvega studento: Brian Waterman, 224B Cramer Bldg., University of Missouri, Columbia, Missouri 65201, Usono.

19-jara lernantino deziras korespondi. Mi kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, interesajn ludilojn, amas muzikon (blues, jazz), vojaĝojn kaj motorsporton. Danuta Paluszkiewicz, ul. Dabrowskiego 5/5, Leszno (Ulkp), Polujo.

Ĝelernantoj 12—16-jaraj kaj iliaj ĝeinstruistoj 23—45-jaraj deziras korespondi. Interesas nin ĉio, ni kolektas markojn, bildojn, grafikojn k.t.p. Skribu al: Julio Banhegyi, Teleki tér 24, II e, Budapest VIII, Hungarujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30
Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Trvkt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar
Boks 942, Oslo 1.